

Vinko Ošlak

El mia taglibro 2009

Dimanĉo, 1-an de februaro

Ĵurnalistoj en Aŭstrio ĝis nun ne lernis kompreni du bazajn donitaĵojn. Unue: la episkopo de Romo (papo) nomumas episkopojn dise en la mondo suverene, krom se ekzistas aparta kontrakto, kutime nomata konkordato, en kiu povas troviĝi speciala klaŭzo, laŭ kiu la suvereno de la koncerna ŝtato aŭ ĝia registaro havas rajton ne akcepti la decidon el Romo. En la tempo de la habsburga monarkio tian rajton havis la imperiestro – eĉ pli, li havis privilegion malakcepti la elektitan papon. Nun la aŭstria registaro havas rajton refuti la papan decidon pri konkreta persono, kiun la papo proponis por esti instalita loka episkopo. Due: aŭstriaĵ ĵurnalistoj daŭre kredas, ke por nomumi novan episkopon validas la kriterioj de ilia ideologia kaj politika prefero, kiu grandparte estas maldekstra en senco de etburĝa salonmaldekstro de la aŭstria tradicio. Tiel ili starigas demandon, ĉu la nova proponita episkopo (Wagner) apartenas al la tendaro de „progresivaj” aŭ de „konservativaj” sacerdotoj. Bedaŭrinde Romo mem ne aplikas pli konvenajn kriteriojn. En Vatikano oni enketas, ĉu la kandidato montras sufiĉan obeemon kaj lojalon al la episkopo de Romo. Nek ĵurnalistoj nek la papa teamo starigas la esencan demandon, ĉu la kandidato fundamentas sian kredon en la Biblio; ĉu li estas edzo de unu virino, gastema kaj modela homo, kiel la neprajn kvalitojn de episkopo detale priskribas apostolo Paŭlo (1 Tim 3,2).

Tiel same okazas ankaŭ nun, kiam Benedikto XVI-a elektis por la diocezo Linz paroĥestron Gerhard Wagner. La ekster- kaj kontraŭeklezia mondo kaj fortaj partoj en la eklezio mem riproĉas al li eldirojn, kiujn ili prenas por „konservativaj” kaj „nekonformaj kun la tempo”. Oni riproĉas al li komenti kelkajn naturkatastrofojn en la jaro 2005 en ligo kun morala dekadenco en tiuj lokoj. Do, mi devas konstati, li en tio komplete pravas. Same lia komento pri la libro Harry Potter de Joanne Rowling, ke en ĝi troviĝas elementoj de satanismo, estas laŭ mia propra sperto – mi legis du volumojn el la tuto – tute prava.

Kompreneble, ankaŭ tiu ĉi episkopa kandidato ne plenumas la normojn de vera kristana episkopo, kies profilon skizas apostolo Paŭlo, ja ankaŭ li, ĉar katoliko, praktikas kultadon, kiu rekte kontraŭas la instruon de la Biblio. Tio validas por ĉiu katolika episkopo kaj sacerdoto. Tamen inter ili troviĝas diferencoj. Gerhard Wagner almenaŭ en kelkaj gravaj punktoj troviĝas pli proksime al la instruo de la apostoloj ol la plimulto el aliaj.

Malpli trafa estas la eldiro de G. Wagner pri samseksemuloj: „La homoseksualecon oni povas kuraci...” Se la homoseksualeco estus malsano, Dio ĝin ne malpermesus kaj ne minacus per eterna perejo de samseksemuloj. La homoseksualeco estas laŭ la biblia instruo simple peko. Nature, ne la natura inklino al la sama sekso estas aktuala peko de la koncerna persono, tamen ankaŭ tiu fenomeno estas postsekvo de la origina peko kaj de posta koruptado de la homaro, kiel ni legas ĉe Paŭlo: „*Tial Dio fordonis ilin al malhonoraj pasioj; ĉar iliaj virinoj ŝanĝis la naturan uzadon en kontraŭnaturan; kaj tiel same ankaŭ la viroj, forlasante la naturan uzadon de la virino, brulis en sia volupto unu al alia, kaj viroj kun viroj faris hontindaĵon kaj ricevis en si mem la taŭgan rekompencan de sia malvirto*” (Rom 1,26-27). Sed en tiu ĉi punkto li estas kaptito de sia falsa eklezio.

Lundo, 2-an de februaro

Estas strange, kioma publika intereso regas en Aŭstrio – kaj same en Slovenio – pri tio, kiu persono regu kiel episkopo unuopajn diocezojn, dum la preĝejoj estas ĝenerale malplenaj kaj preskaŭ neniun turmentas la demando, kiu regas super ĉiuj mondoj kaj kiu devus esti reganto de niaj koroj...

Vokis profesoro Hlebš el Salburgo (Salzburg), unu el lastaj seriozaj filozofoj, demandante min, kion mi opinias pri la demando de islama religia instruado en Aŭstrio – surfone de la plej noa afero, post kiam estis publikigita la enketo, laŭ kiu ĉiu 5-a islama religiinstruisto kontraŭas la principojn de la demokratia ŝtatordo. Mi povis respondi nur, ke la problemon fabrikis ekskluzive la politika povo de la lando. Islamanoj kondukas konkorde kun sia kredo kaj konvinko. Bedaŭrinde oni tion ne povas konstati pri la aŭstria politika nomenklaturon. Sed la problemon kreis jam la „apostola moŝto” imperiestro Francisko Jozefo, kiu en la jaro 1913 proklamis islamon ŝtate rekonita religia komunumo. Kial li tion faris? Ne pro sincera konvinko en liberalisma aŭ eĉ socialisma senco, kvankam Habsburgoj okulumis tiel kun socialismaj, kiel ankaŭ kun liberalismaj ideoj. Li tion faris, ĉar li volis firmigi lojalecon de bosniaj islamanoj al sia trono – kaj per tio li definitive perfidis Jesuon, en kies misia servo la absburga domo estis proklamita. Kiel tiu sama dinastia klano komencis, estinte en mezepoko svisa rabista kavaliraro, tiel ili ankaŭ finis, estinte la komencantoj de la 1-a mondmilito. Ĉu do la imperiestro devus malpermesi kaj persekuti la idolanan kulton de islamanoj, vivintaj en lia imperio, kiel la sama dinastio antaŭ Jozefo II-a persekutis verajn kristanojn ĝis aŭtodafeo? Ĉu li devus malpermesi konstruadon de moskeoj sur la teritorio de la habsburga imperio?

Ne temas pri la samaj aferoj. Unu afero estas statusigi certan kulton ŝtate rekonita kaj tiel nepre privilegiita institucio, kiu esence kundifinas la spiritan kaj sekve ankaŭ la moralan fundamenton de ĝi. Tute alia afero estas, en senco de bazaj homaj rajtoj al ĉiu civitano lasi liberon de propra kredo, inkluzive de propagando, instruado (ekster la ŝtata kadro de devigaj publikaj lernejoj) kaj de societjura organiziĝado, krom se la instruado de certa religio rekte negas la principojn de libera kaj jura ŝtato.

La aŭstra monarkio estis difinita per katolika religio. Per dekretoj de la imperiestro Jozefo II-a la hebrea kulto kaj la kristanaj eklezioj en senco de aŭgsburga kaj ĝeneva (helveta) konfesioj fariĝis liberaj kaj permesitaj. Por vera kristano tio sufiĉas: esti en la ŝtato tolerata. Lia regno ne estas de tiu ĉi mondo, sekve li ne serĉas statuson de ŝtata rekono kaj privilegio. Sed koncerne islamon la afero ne estas tiel simpla. La instruado de islamo rekte negas la fundamentajn principojn de ĉiu demokratia kaj jura ŝtato. Ne gravas, ĉu la adeptoj de la islama kulto tiun principe kontraŭstaran sintenon tuj efektivas aŭ praktikas „armisticon” – ilia religio principe kontraŭas kaj konsekvence ankaŭ kontraŭbatalas la fundamenton de almenaŭ kulturkristane – kaj kultur- kaj valorokristanaj estas ĉiuj eŭropaj ŝtatoj krom Bosnio, Albanio kaj Kosovo – koncipitaj eŭropaj ŝtatoj.

Mi vidas nur unu puran solvon. La ŝtato proklamu ankaŭ por islamanoj la publikan societnivelecan rajton (kiel por aŭtentaj bibliofidelaĵoj kristanoj) kun inkluziva rajto konstrui moskeojn kaj organizi religian komunumon subkondiĉe, ke la koncernaj muftioj resp. prezidantoj de la islamaj religiaj komunumoj per publika akto subskribu apartan kontrakton kun la ŝtato, ke ili kiel civitanoj aŭ gastoj de tiu ŝtato senrezerve kiel sian civitan normon akceptas la konstitucion kaj la leĝojn de tiu ŝtato, prenante ilin superaj al la prijuraj kaj priŝtataj doktrinoj, venantaj el diversaj eksplokoj de Korano aŭ de aliaj islame inspiritaj instruoj. Se iu komunumo toleras predikadon aŭ agadon kontraŭ tia kontrakto, la ŝtato estas rajtigata malpermesi tian komunumon kaj ĝian agadon kaj redukti la nivelon de ŝtata rekoneco je nivelo de persona libero elekti kaj praktiki religian kredon laŭ libera arbitro.

Mardo, 3-an de februaro

Vere interese. Mi spektas tre interesan televidan prezentadon de iu privata akvariumo, en kiu olda sinjorino flegas koralfiŝojn el suda maro. Ĉiu fiŝo estas figura kaj kolora artaĵo por si. Kij nun venas la preskaŭ nepra komento, kian oni aŭdas ĉe similaj okazoj: „Die Natur hat sich dabei durchaus etwas gedacht!” (La naturo pensis pri io ĉikaze). Bone, tio estas laŭvorta traduko, kiu ne redonas komplete tion, kion la olda sinjorino diris. Laŭsence oni devus traduki: Dum la naturo kreis tiujn ĉi vivestaĵojn, ĝi pripense aranĝis ĉion kaj potsekvis klaran

celon. Nu, enviinde inteligenta kaj artgenia „naturó”, ĉu ne? Se ŝi anstataŭ „naturó” estus dirinta „Dio” aŭ „Kreinto”, la amaskomunika mondo tuj denuncus ŝin „kreisma fundamentalisto”. Logike atribui al Dio eblecon krei, pripensi, plani, starigi celojn kaj ilin postsekvi, al Dio, perceptata kiel persono kun konscio, inteligento, volo kaj povo – tio estas en eŭropaj demokratioj, fakte tiranioj de aboteco, praktike, eĉ se ne formale, malpermesite. Demokratioj toleras Dion kaj kredon en Lin nur plu en folkloro kaj domeno. Sed atribui inteligenton, volon, pripenson, saĝon kaj povon ĉion-ĉi realigi al „naturó” – jen tio estas larĝe akceptita „saĝo” de nuna mondo, estu tio eĉ tiom kontraŭdira kaj absurda. Kial finfine? La olda virino mem baldaŭ aldonis novan sloganon, admirante belecon de la fiŝoj, kiun ankaŭ mi ne povis ne admiri: „Es muß ja nicht unbedingt der Mensch die Krone der Schöpfung sein...” (Ne estas nepre la homo la krono de la kreitaro). – Tio, jen, estas la celpunkto de tia parolmaniero. Se la naturó – do ŝtonoj, akvo kaj gasoj – kreis ĉiujn vivestaĵojn, tiel ankaŭ la homon, tiam oni fakte ne povas scii kaj diri, ke la homo estus la krono de la kreitaro. Komprenoble, la simpatia sinjorino pretere forgesis, ke laŭ ŝiaj propraj kriterioj ŝi devus forstrecki du nociojn, kiujn ŝi tamen uzis: kronon kaj kreitaron. Naturó ne kreas, ĝi per kaŭzoj produktas sekvojn. Kaj en naturó ne troviĝas kronoj. Do: ne nur, ke en tia mondo, en kiu nur la naturó estas kaj agas, ne troviĝas krono kiel simbolo de hierarkia pinto – ĉu relativa, se temas pri kreitaro, ĉu absoluta, se temas pri Dio. En la naturó, se sendia kaj tiel senspirita, ne troviĝas supre kaj malsupre, bone kaj malbone, prave kaj malprave, juste kaj maljuste ktp., sed nur diversstrukture kaj diversforme troviĝantaj aĵoj. En la estetika doktrino de la postkanta epoko tio jam delonge estas la situacio. La fina celo de darvinisma dogmo ne estas pli malpli racia klarigo de naturfenomenoj kaj naturprocesoj, sed simple detronigo de Dio kiel la Kreinto de ĉio ekzistanta, la prizorganto kaj vivtenanto de ĉio-ĉi – kaj detronigo de la homo kiel *imago Dei* (imago de Dio) kaj heredanto de Lia eterna regno. Pro tio la tuta historia (kaj histeria) karnevalo de ĉiuj falsaj reĝoj kaj falsaj profetoj (sciencistoj) kun ilia pintpeko je la fino de la XX-a jarcento kaj je la komenco de nia.